

Cifereca prilaboro de la Zamenhofaj adresaroj

Mgr. Marek BLAHUŠ (E@I)
<marek@ikso.net>

KAEST 2012, Modra, 2012-11-18

Projekto

- L. L. Zamenhof: *Adresaro de la personoj, kiuj ellernis la lingvon Esperanto* (1889-1909)
 - Informoj pri proksimume 22.000 esperantistoj
- analizo de la frua Esperanto-movado kaj de ties ĥronologie-geografia disvastiĝo
- Fonduso por subteno de interlingvistiko kaj esperantologio de ESF (ESF/Iko-Eio)

Enkonduko


- Promes-kampanjo iniciatita en la Unua libro:
 - 8 eltranĉendaj slipoj kun promesdeklaro
 - Celo: 10.000.000
 - Multaj tamen indikis „(mi lernos) senkondiĉe“
 - Unua parto de la adresaro aperis jam en 1889
- *Adresaro de la personoj, kiuj ellernis la lingvon Esperanto*
 - Unue en *(La) Esperantisto* (ekde 1889), poste en apartaj kajeroj (ĝis 1909)
 - Kompilaĵon eldonis Ludovikito (1992, 2004)

Motivoj kaj celoj

- Ebloj esplori la fruan Esperanto-movadon:
 - Ekkoni la unuajn esperantistojn
 - Sekvi la geografian kaj socian disvastiĝojn
 - Rekonstrui la rilatojn ene de la reto de pioniroj

Motivoj kaj celoj (2)

- Enhavo de tipa adresara enskribo:
 - Familia kaj persona nomoj
 - Socia stato (metio, fako, soldateco...)
 - Stratadreso
 - Loĝurbo (foje kun regiono - ĉefe en Rusio)
 - Loĝlando
 - *Nomo de la persono altirinta*
 - „akademia genealogio“



Motivoj kaj celoj (3)

- La materialo ankoraŭ neniam tutece prilaboriĝis
 - Aperas nur listoj de la aperintaj kajeroj
 - Statistiko nur pri la unuaj mil (Korĵenkov 2009)
- Celo de la projekto:
 - Disponigi la datumojn en prilaborita formo
 - Mem plenumi kelkajn bazajn analizojn
 - Statistikoj
 - Animaciataj mapoj (geografie-ĥronologia dimensio)

Labormaniero

1. Ekhavi la Zamenhofajn adresarojn
2. Skani la librojn
3. Optike rekonigi la skanaĵojn
4. Provlegi la rekonitaĵon
5. Strukturigi la tekston
6. Identigi la aperantajn nomojn de personoj kaj lokoj
7. Retrovi hodiaŭajn nomojn kaj geografiajn koordinatojn
8. Konstrui genealogiecan arbon laŭ la „altirintoj“
9. Konstrui animacian mapon pri la disvastiĝo
10. Ligi la personajn nomojn kun artikoloj en la Vikipedio
11. Publikigi la rezultojn en la interreto kaj prese

Laborkvanto

- Proksimume 700 paĝoj da kruda materialo
- Ekz.: Provlego kaj strukturigo (paĝoj 4 kaj 5):
 - 10 minutoj / paĝo
- Labordivido:
 - Unu triono paĝoj 2-5 (skanado, rekonado kaj provlegado)
 - Unu triono paĝoj 6-8 (identigado de personaj kaj lokaj nomoj)
 - Unu triono paĝoj 1, 9-11 (starigo de labormedio, analizado de rezultoj, aranĝo de prezento, ceteraj)
- Plenumantoj: Marek Blahuš, Václav Zouzalík

Dankon pro via atento.

Marek Blahuš (E@I)
<marek@ikso.net>